# LA PACDEFENDANTO

N-o.41. NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ĈEĤOSLOVAKIO Majo 1955

## PRI LA SIGNIFO DE NIA TUTŜTATA

Jam de post kelkaj jaroj niaj ĉeĥoslovakaj gekamaradoj ne havis la okazon amase kunveni por interkonatiĝi kaj komune pritrakti siajn problemojn. Kompreneble, tia stato ne malmulte kontribuis al parta stagnacio en la aktiveco de niaj rondetoj kaj tuta movado. Kaj tamen malgraŭ tio eblas konstati, ke niaj aktivuloj, kvankam ofte izolitaj de la tuto, ne ripozis. Fondiĝis novaj rondetoj, en multaj lokoj funkciis senĉese kursoj el kiuj elkreskis aro da novaj kaj kuraĝaj, entusiasmaj adeptoj kaj disĉiploj de nia kara majstro. Ĝis nun anstataŭis nia cirkulero la personajn kontaktojn. Ĝi portis informojn al niaj rondetoj kaj izoluloj pri la progresoj de nia movado en diversaj lokoj de nia lando, nek pri silentante malfacilaĵojn, kun kiuj niaj aktivaj gek-doj renkontiĝis. Granda parto de nia organo estis dediĉita por informi vin ankaŭ pri ĉiuj gravaj okazintaĵoj en nia eksterlanda movado. Krom tio naskiĝis ankoraŭ kelkaj regionaj cirkuleroj, kiuj same grave kontribuis al tiu celo kiel la regionaj kunvenoj kaj konferencoj organizitaj jam regule en kelkaj lokoj de nia lando.

Kvankam ĉiuj, tiuj entreprenoj tre grave helpis konservi nian movadon post la memlikvido de la EAĈSR, ili tamen ne povas anstataŭi plensukcese la mankon de amasa persona kontakto, kiu sola povas doni al ĉiu el ni fortan inspiron, entusiasmon kaj novajn instigojn al ankoraŭ plia aktiveco k. memkonscio. La malnovaj gek-doj kiuj jam havis eblecon pasi kelkajn tagojn en nia internacia [illegible]a familio, dum kongres[illegible] lan[illegible], kaj ek-[illegible] [illegible] rakont[illegible] pri siaj spertoj. Ĉiu tia interkonatiĝo kun amaso da samideanoj donis al ili novan forton kaj entusiasmon al plua batalo por nia afero.

Ankaŭ nia TUTŜTATA devas fariĝi unu el la plej amasaj renkontiĝoj de gesamideanoj en nia lando. Kaj ĉar nur malfacile, aŭ tute ne eblas al niaj gek-doj viziti eksterlandajn kongresojn, ni forte klopodas alvenigi pli grandan nombron da eksterl. gek-doj al nia TUTŜTATA en Otrokovice la 7-11 de julio.

Ni forte esperas, ĉar ankaŭ la eksterl. k-doj scivolemas persone renkontiĝi kun la niaj, kiuj ja estas la unuaj batalantoj sub la devizo PER ESPERANTO POR LA MONDPACO, ke niaj klopodoj sukcesos kaj ilia multnombra partopreno donos freŝajn impulsojn kaj novajn instigojn al nia landa movado.

Kompreneble, nia TUTŜTATA bonvenigas ne nur esp-pacdefendantojn, sed ĝi estas malfermita por akcepti ĉiujn esp-istojn, eĉ tiujn, kiuj ankoraŭ hezitas kredi, ke la de ni irata vojo estas la nuntempe plej ĝusta, por ke ili havu la okazon persone konvinkiĝi kaj aliĝi ankaŭ al nia batalfronto kaj kontribui al la sopirata venko.

Ne estas bagatelo, aranĝi konferencon, kvazaŭ kongreson. Multaj gek-doj estas jam preskaŭ duonjaron ŝarĝitaj per la preparoj de ĝia sukcesa p[illegible]do. Sed malgraŭ ĉio, ĝi [illegible] nur tiam plenumi sian taskon, se ĉiuj gekamaradoj kon[illegible]iĝos pri sia devo kaj [illegible] amasa partopreno kontribuos al efektivigo de ĝia programo kaj ceteraj celoj. Nur forta kaj unueca organizo havas ŝancon, akiri venkon.

BURDA Rudolf

## ALVOKO AL LA TUTA MONDO

La japana popolo, kiu spertis la trian fojon la domaĝojn de la teruraj nukleaj armiloj ĉe la eksperimentoj de hidrogenbomboj sur Bikini post la tragedioj de Hiroŝima kaj Nagasaki, nun kun 23 milionoj da subskriboj solene alvokas al la tuta mondo.

La du bomboj en unu momento forrabis la vivojn de 200 mil homoj en Hiroŝima kaj 90 mil en Nagasaki. Krom tio oni ne povas diri, ke la tragedio finiĝis definitive en aŭgusto antaŭ 10 jaroj. Pli ol ĉio la mizeron de la nukleaj armiloj klare montras la fakto, ke feliĉe sin saviintaj homoj eĉ hodiaŭ ankoraŭ formortas ne atenditе pro la atommalsano.

La influoj al japana popolo, kiujn donis la eksperimentoj de hidrogenbomboj sur Bikini atolo estas pli vastaj kaj profundaj. Tio ne limigas je la morto de s. Kubojama kaj viktimiĝo de la ŝipanoj de Hukurju-maru n-ro 5. La "polvo de l morto" kun radioaktiveco infektis fiŝojn, la gravan fonton de albumino por Japanoj, miksite kun pluvo malpuriĝas la agraran produktaĵon kaj tiel minacas la vivon kaj vivtenon de 80 miliona japana popolo.

Jam neniel plu ripetu ĉi tian mizeron de l teruraj nukleaj armiloj sur la homaro de l mondo. La kulturo, kiun konstruis la homaro dum 5 mil jaroj, neniel povas rekreiĝi. Se unu foje okazus milito kun nukleaj armiloj, ĝi alportus plenan pereon de l homaro mem. Ni, japana popolo alvokas al la homoj de la mondo surbaze de niaj propraj spertoj:

La uzo kaj eksperimentado de nukleaj armiloj devas esti senkondiĉe malpermesataj!

Ni postulas, ke sur la bazo ĉesigi la eksperimentojn kaj neniam uzi la nukleajn armilojn la koncernaj ŝtatoj havu sinceran negocadon kaj atingu la konvencion por ke ili abolu ĉiajn amasmortigilojn por eterne. Ni elkore esperas, ke plej baldaŭ realiĝu la glora estonteco, kiam la atomenergio estos uzata nur por la paco kaj feliĉo de la homaro.

Ni aprobas, ke la Unuiĝinta Naciaro daŭre klopodas por la redukto de la armado kaj malpermeso de la amasdetruaj armiloj.

Ni esprimas nian indignon kontraŭ tiu potenco, kiu ne hontas malkaŝe deklari uzon de la nukleaj armiloj.

Ĉu al la vojo de atomenergia milito? Ĉu al vojo de glora paco? La mondo nun staras sur la grava vojforko. Nun estas la tempo, kiam la homoj de la mondo kun unuiĝitaj fortoj devas protekti la vivon kaj feliĉon de la homaro el sub la minaco de atomarmiloj. Nun estas la tempo, kiam la homaro por eterne devas ekstermi la militon kaj konstrui la gloran estontecon tra tiu ĉi batalo.

La japana popolo, kiu jam kolektis pli ol [illegible] milionojn da subskriboj por la malpermeso de la nukleaj armiloj, kaj ankoraŭ plue kolektadas ĉiu tage kelkdek milojn, alvokas unuanime al ĉiuj homoj de la mondo:

Ni nun firme unuiĝu por la glora estonteco! Kaj ni aspiras, ke ni koncentriĝu la fortojn al la Monda Kongreso por Malpermeso de la Nukleaj Armiloj, okazonta en aŭgusto de tiu ĉi jaro en Japanio.

LA TUTLANDA KONFERENCO DE LA MOVADO POR KOLEKTADO DE SUBSKRIBOJ KONTRAŬ LA ATOM-KAJ HIDROGEN-BOMBOJ.

KLEG: Nakacu-hamadori 2-20, Oojodo-ku, O S A K A , J a p a n i o .

Represo kaj traduko estas petataj.

---

## FORMOSA - TAJVAN

La okuloj de la mondo nun estas turnataj al Formosa Markolo, kaj ĉiuj homoj deziras la pacan solvigon de la Formosaj problemoj. Tio estas tute prava, ĉar ĉiuj jam bone scias, ke militaj agoj rilate al Formoso senpere kondukus al la 3a mondmilito.

Kiel do oni povos solvi la problemojn?

Estus dezirinde ne nur por Ĉinoj, sed ankaŭ por ĉiuj popoloj, ke la registaro de Popola Ĉinio kaj la ĉefuloj de Formoso ne prenu batalilojn, sed plene negocadu por

ke Formoso reiru en paco al Ĉinio. Kaj en efektiveco Popola Ĉinio neniam rifuzis solvi la problemojn per negocado. Rifuzis tion ne la Pekina registaro, sed la registaro de Ĉiang Kaj-ŝek, kiu konstante kriadas pri reakiro de Ĉina Ĉeflando kun la subteno de usona militpotenco.

„Usono, retiriĝu el Formoso!" - jen estas unu el la plej gravaj nuntempaj sloganoj de ĉiulandaj pacamantoj.

KAJI Hirokazu

/kopiita el "LA MOVADO" n-o.49./

## LA SCIENCA AKADEMIO EN MOSKVO SIN OKUPIĜAS PER ESPERANTO.

La 16.de aprilo ricevis la Bulgara Esperanto Kooperativo/BEK/leteron de sovjeta lingvosciencuIo E.A.Bokarev, kies tekston ni laŭvorte prezentas ĉi sube al niaj legantoj:

"Esperanto Kooperativo
Sofia, Bulc.Stalin 40.

Karaj kamaradoj!

Mi estus tre dankema al vi, se vi sendus al mi katalogon de esperanta literaturo, kiun mi povus mendi de vi kaj ankaŭ komunikus, ĉu estas eldonata nun en Bulgario iu esperanto revuo kaj kiuj abonkondiĉoj por ĝi. Mi estas supera scienca laboranto de lingvistika instituto en Sovjet-Unia Scienca Akademio, kaj por mia laboro estus grave ricevi regulan informadon pri Esperanto-movado. Post via respondo mi penos mendi per Scienca Akademio la revuon kaj ian Esperanto-literaturon de vi.

Samtempe mi sendas al vi ekzemplerojn de nia revuo "Problemoj de lingvoscienco", kies respondeca sekretario mi estas. Eble ili prezentos al vi ion interesan.

Kun kamaradeca saluto

E.BOKAREV

La 5.de aprilo 1955.

Mia adreso: MOSKVO 919, Volhonka 18/2 INSTITUT JAZIKOZNANIJA, E.A.Bokarevu."

Jen ekzemplo kondamninda: La "BEK" nia redakcio por informo kaj anpro ĝia ĝisnuna oportunismo kaj malkurageco nun staras preskaŭ kun malplenaj manoj antaŭ grava Sovjeta Instituto, kiu petas vidi ĝian laboron per kaj por Esperantan, sen demandi, ĉu iaj oficialaj landaj instancoj donis al ĝi por tia agado permeson !- Ni almenaŭ kredu, ke tiu ĉi fakto estu por la estonto averta ekzemplo por ĉiuj malkuraĝuloj kaj esp-istaj oportunistoj en la Popoldemokrataj landoj, kiuj al si kredigas, ke per Esperanto por la Mondpaco eblas labori - unusole nur kun oficiala permeso kaj aprobo. Ili nun rapidu atingi ĝin, kion ili malfruiĝis antaŭ ol estos tro malfrue !

La Sovjeta lingvosciencuIo tamen certe ne restos sen materialo. Li regule ricevos senpage nian organon kaj ĉiujn regionajn ĉirkulerojn el Ĉeĥoslovakio Ankaŭ MEM liveros sian oficialan organon PACO kaj ni invitas ĉiujn Esperanto-societojn, ligojn, asociojn kaj individulojn, ke ili klopodu senpage havigi al k-do.E.A.Bokarev ĉiuj Esperanto eldonaĵojn, gazetojn kaj literaturon de progresema senco kaj estu komisiitaj specialaj k-doj por regule raporti al la Scienca akademio pri ĉiuj gravaj okazintaĵoj en la progresema Espmovado tutmonda.

La eminenta intereso de ĉiu celkonscia esp-isto devas esti, ĉiamaniere helpi al nia sovjeta aktiva kamarado Bokarev, ke li sukcesu plene per siaj sciencaj enketoj konvinkiĝi la Sovjetan Sciencan Akademion en Moskvo pri la alta valoro de Esperanto kaj la gravaj servoj, kiujn ĝi jam donas kaj ankoraŭ pli povus doni al la tutmonda pacdefendantaro, se la Sovjeta Scienca Akademio decidus doni oficialan aprobon por ĝia uzado kaj disvastigado.

Ni insiste petas ĉiujn gekamaradojn, nepre kaj senprokraste sendu la petatajn materialojn rekte al la adreso de k-do.E.A. Bokarev.

Rud.BURDA

Represo estas dezirinda. Bonvolu sendi unu kopion al kaŭ informu nin pri la materialo kiun vi disponiĝos al la Instituto en Moskvo.

## G E K A M A R A D O J

La tempo rapidas, senprokraste jam aliĝu por nia T U T Ŝ T A T A

## S E N P R I P E N S E M O

Se estas Manjo,nobla via sento,
nervige vin kortušas ĉiu ploro,
neprave vi alkuras kun fervoro
tuj kiam pretorpasas regimento.

Ĉar Manjo,se vi pensus,dum momento,
la sangajn terurajojn de la gloro
milita, ve, sendube via koro
ne nagus tiel blinde en kontento.

La homo eleganta, oficiro
amema, kiu ŝajnas ideala
al la fraulinaj revoj,iĝos viro

freneza,sangavida, kanibala,
kaj tiam vi komprenos,ke deliro
funebra estas gloro perbatala !

## C I V I L I Z O

Civilizo ! Se estas civilizo
pliobligi vetvete kaj malŝpare
aparatojn militajn; jaguare
de junuloj prepari la provizon

por estonta milita mobilizo;
krii kontraŭ murdoj,sed korsare
montri sin mem murdisto,solidare
kun piratoj kaj ties rabdevizon

uzi masko sub la eŭfemismo
patruĵamo; se tiel fivenena,
oficiale krima militismo

estas ja civilizo kaj sangplena
neas vivon al mia optimismo...
civilizon mi trovas abomena.

Tiujn ĉi du poemojn speciale dediĉis por nia bulteno :

Saldanha C a r r e i r a

## A L  L A „P A C O"

Ŝtata usona sekretario Dalles en Vaŝingtono dum kunveno de estintaj edukatoj de jezuitoj proklamis neeviteblon de milito.

Li diris,ke paco nun servas al komunistoj,do li ekskluzivas la pacan kunekzistadon de popoloj. Finiĝinte per tiel nomita "minaco de komunismo"li asertis, ke ekzistas du vojoj: milito aŭ kapitulacio. Laŭ li,paco kondukas la mondon kaj homaron al regreso kiam la homo perdas la moralon kaj intelekton.

Sinjoro Dalles tute perdis moralon kaj intelekton.Evidente laŭ lia opinio murdigo de Japanoj per atombomboj kaj murdigo de ĉinaj reprezentantoj dum flugado al Honghongh estas bona progreso. Sinjoro Dalles,vi preparas atom- kaj hidrogen-bombojn por amase pereigi infanojn,virinojn kaj maljunulojn.Ĉu tio,laŭ vi,veršajne estas morala ago de intelekteco?

Vi,sinjoro,tute forgesis lerni el la historio. Post la unua mondmilito via imperialisma tendaro perdis Rusion kaj post la dua mondbuĉado ĝi jam perdis tutan vicon da landoj en Europo eĉ Azio: Bulgarion,Romanion,Polion, Ĉeĥoslovakion,Hungarion,Albanion kaj Ĉinion,Koreion,Germanion kaj Hindion.

K-do.Malenkov en sia raporto dum la 19a kongreso de la rusa komunista [illegible] en 1952 deklaris: "Estas pli ol certe,ke tria mondmilito kondukos al generala disfalo de la kapitalista sistemo." Ankaŭ k-do.Stalin jam en 1934 diris:„Malgraŭ la spertoj el la unua imperialisma milito,burĝaj politikistoj denove propagandas militon kvazaŭ dronanto,kiu kaptas sin je naganta pajlero. Tio signifas,ke ili sin jetas flugrapide en abismon."

Do milito nun ankaŭ servas al komunismo pli bone ol la paco ?

Estas la historia ordo,ke ĉiam novaĵo anstataŭas la putrantan malnovon. Molotov diris,ke en la nuna tempo ĉiuj vojoj kondukas al komunismo.

Sinjoro Dalles! Vi neniam sukcesos returni la radon de la historio,nek per hidrogenbomboj, nek per bakterio milito. Vi jam tre malfruiĝis!

Boris SOKOLOV - USSR.
ZDOLBUNOVO-ROV.

## RENOVIGU VIAN JARABONON !

Malgraŭ kelkfoja atentigo multaj gek-doj,ankoraŭ ne plenumis sian devon. Grandaj elspezoj nin atendas por nia TUTŜTATA en Otrokovice.Rapidu egaligi almenaŭ vian jarabonon,por ne kaŭzi al ni mal-facilaĵojn !

**ABONPREZOJ por 1955:**
LA PACDEFENDANTO enlande..12.-Kčs
por eksterlando 13.-Kčs. PACO=13.-

## TUTŠTATA KONFERENCO DE ESPERANTISTAJ PACDEFENDANTOJ DE 7-11. JULIO 1955 en OTROKOVICE

Koresponda adreso de la Organiza Komitato= K-dino.Fany MATUŠOVÁ, Krátká č.812,OTROKOVICE /Morava/ Al tiu adreso sendu tuj vian aliĝilon kun ĉiuj pagoj.Al nia konferenco estas invitataj aliĝi ĉiuj geesperantistoj,kiuj simpatias kun nia batalo PER ESPERANTO POR LA MONDPACO.Aliĝilojn petu ĉe la supra adreso.

Gastigado: eksterlandaj gek-doj, kiuj bezonos senpagan loĝadon aŭ manĝadon dum la konferenco,tion bonvolu anonci al k-do.K. KRAFT, Županovice,pošta HŘÍMĚŽDICE u Dobříše,Ĉeĥoslovakio.Same faru la ĉeĥosl.gek-doj,kiuj bonvolas pagi liton aŭ manĝon por iu eksterlanda k-do/ino/aŭ donaci por tiu celo kelkan monon.Ricevitajn donacojn ni publikos en nia organo sub aparta rubriko.

Kiel mendi tranoktejon: ĉar sur la aliĝiloj estas menciita mendebleco de litoj por la 7,8,9,10. kaj event.por la 11.de julio kaj ni supozas,ke multaj gek-doj jam alveturos la 6an de julio aŭ vespere,aŭ dumnokte kaj bezonos ie dormi,necesas tion sciigi aparte al k-dino.Matušová,por ke ŝi mendu por vi liton ankaŭ por la 6. de julio.Ĉar la konferenco komenĉos la 7an de 9a matene,eblas ankaŭ alveni per noktaj trajnoj ĝis la 7an matene.En tia kazo vi ne bezonas mendi liton por la 6. Lito en hotelo por unu tago,kun propra banejo kostas 15-17 Kčs. Lito en komun.tranoktejoj por 1 tago kostas 8.-Kčs.

Por la 6/7.mendas liton nur tiuj jam la 6/7 tranoktos en Otrokovice.

Por la 10/7.mendas liton nur tiuj partoprenos la tuttagan ekskurson al Kastelo Lešná la 11/7 kaj devos ankoraŭ en Otrokovice de la 10.ĝis la 11.tranokti.

Konferenc-kotizo:estas por ĉiu 10 Kčs.Ĝin necesas sendi samtempe kun la aliĝilo plej malfrue la 15 de junio.Al malfruiĝintoj neeblas garantii loĝejon.Tiu ĉi mono estos uzata por mendi kunvenejojn k. pagi elspezojn por ceteraj necesaj arangoj.

Programo: precizan programon ricevos ĉiu aliĝinto ĝustatempe.

La Japana Esperanto Ligo promesis por nia TUTŠTATA disponigi filmon "HIROŠIMA".Ni esperu, ke nia doganejo permesos ĝian eniron.

K-do.Josef PECH-Plzeň,prezentos lumbildparoladon pri siaj vojaĝoj per Esperanto tra Afriko,Maroko,Jerusalemo,Egiptio ktp.

K-dino.Věra BORSKÁ,operkantistino el BRNO,prezentos al ni abundan Esp-lingvan repertuaron.

Konferencŝtampo: en la konferencejo oni stampos al vi ĉiujn viajn poŝtaĵojn per aparte bela konferencstampilo.

Literaturvendejo: en la konferencejo funkcios vendejo de abunda Esp-literaturo.Al tiu vendejo vi ankaŭ povas vendi viajn nebezonajn Esp-aĵojn.

Aŭkcio: dum la Kultura Vespero okazos granda aŭkcio de plejdiversaj eksterlandaj objektoj:libroj,pupoj,albumoj,pentraĵoj,p.m., tuketoj ktp.Donacojn por tiu celo bonvolu sendi al k-dino Fany MATUŠOVÁ,Krátká č.812,OTROKOVICE /Morava/ Ĉeĥoslovakio.

Fakaj kunvenoj: ĉiufakaj studentoj kunvenos por diskuti kaj interkontakti sub gvido de k-do.J. WERNER,Helceletova 16,BRNO. Jam nun anoncu al li vian partoprenon kaj diskutproponojn.

Por la konferenco aliĝis ĝis la 30 de aprilo jam jenaj gek-doj: J.Hořejší-Plzeň,Vl.Hořejší-Plzeň, Jos.Reiser-Plzeň,R.Reiserová el Plzeň,B.Zikmund-Plzeň,M.Kulíšek-Plzeň,J.Plachý-Plzeň,Václ.Skála-Plzeň,R.Burda-Plzeň,P.Maroušová-Plzeň,K.Kraft-Županovice,Antonín Frolíšek-Hor.Bojanovice,F.Pytloun-Liberec,Kanoniko A.Macek-Mikulov J.Werner-Brno,M.Robineau-Parizo.

Al la konferenco estas invitita reprezentanto de la SCIENCA AKADEMIO en Moskvo,k-do.E.Bokarev.

ATENTIGO POR EKSTERLANDAJ K-DOJ. Tre urĝas,ke vi jam tuj petu eniĝpermeson,ĉe via landa ĉeĥoslov. ambasadoro/por viziti Spartakiadon/kaj prizorgu la necesajn vojaĝformulajojn,por ke vi ne malfruiĝu.Samtempe anoncu vian partoprenon ĉe nia TUTŠTATA al k-do Rudolf BURDA.Palackého nám.č.6, PLZEŇ,Ĉeĥoslovakio.Tiuj gek-doj, kiuj venos plifrue al nia ĉefurbo PRAHA,por rigardi la ĉefajn aranĝojn de la Spartakiado,anon-

çu sian partoprenon al k-do.Jar. ŠUSTR,Dlouhá 10,PRAHA I.,kiu zorgos pri ilia gastigado,helpo kaj arango de kunveno en klubo de Praha.Neprokrastu! Aliĝu jam tuj!

Por via konciza informo necesas,ke vi relegu la raportojn pri nia TUTŜTATA ankaŭ en la antaŭaj n-oj de nia organo,ĉar ne eblas ĉiam ripeti la samajn sciigojn pro manko da loko.

La Organ.Komit.

AL ABONANTOJ DE PACO

La MEM-estraro petas vian pardonon pro la malfruiĝo de la februara n-o.el Islando.La Kaŭzo estis striko kaj aliaj malfavoraj cirkonstancoj.La marta-aprila ĉeĥosl.eldono jam estis al vi sendita kaj baldaŭ vi ricevos la majan n-on.el Danlando.

JARKUNVENO DE ESP-SOCIETO"RADIO"

Ĝi okazis la 27/3,55.en la legejo"LUMO"en PAZARĜIK /Bulgario/. Partoprenis multaj lokaj esperantistoj kaj ankaŭ delegitoj de la Esp-societo Maksim Gorki el Sofio.Raportojn prezentis la prez.de la estraro kaj revizia komisio.Sofia deleg.al pazarĝikaj esp-istoj gratulis kaj deziris sukceson al ilia estonta agado.En la diskuto multaj prezentis utilajn proponojn.La komuna opinio estis,ke la malbona situacio de la bulg.Esp-movado ne estas objektivaj,sed subjektivaj kaŭzoj kaj jam venis tempo por ilin forigi.La bulg.esp-istoj devas labori ĉiam kaj ĉie per Esperanto por la paco, same kiel la pazarĝikaj,kiuj jam sendis multajn salutleterojn kaj telegramojn al porpacaj organizoj kaj kongresoj eksterlanden.

La kunveno decidis,montri kiel ekzemplon en la paclaboro la gekamaradojn: R,Burda,A.Balague el Sankt Pölten,W.Gilbert-Francio kaj M.Robineau el Parizo. Fine ĉiuj partoprenintoj fotografiĝis antaŭ la legejo LUMO.

N.Carcarov.

AL LA GERMANA TAGO DE PACO

kiu okazis aprile en Dresdeno, estis sendita saluttelegramo en la nomo de ĉeĥosl.esp-istaj pacdefendantoj pere de k-do Reiser el Plzeň kaj salutletero de k-do BURDA en la nomo de MEM.

AL LA PACKONSILANTARO DANLANDA

kaj samtempe al la Monda Packonsilantaro en Vieno estis sendita okaze de la 150a naskiĝtago de eminenta dana verkisto Hans Kristian ANDERSEN,salutletero kaj detala raporto pri la disvastigo de liaj verkoj en Bulgario, pere de la Sofia Esp-societo"M. Gorki".

EL SOFIO

La Esp-societo"Maksim Gorki" kunvenas nun regule ĉiu sabate en nova klubejo,str.Aksakov 18 de la 19.horo. Ĉiutaga ĵurnalo VEČERNI NOVINI/Vesper-novaĵoj/ senpage anoncas horon kaj lokon de niaj kunvenoj kun detalaj programoj.

La MEM-anaro daŭre kreskas. Plifrue kunvenadis 15-20 anoj kaj nun jam pli ol 50.Okaze de la 38.mortotago de LL.Zamenhof prelegis pri lia vivo k.verko k-do.Vasil Čočev,docento de dialektika materialismo en Supera Ekonomia Instituto de K.Marks en Sofio.Aliaj gek-doj deklamis "La vojo","Ho,mia kor,"kaj kelkajn poemojn,vilate la konservon de la mondpaco kaj malpermeson de atom-kaj hidrogenbomboj.

La kunveno finis per laŭtlego de ĵus ricevita letero de sovjeta lingvosciencULO el la Ŝtata Akademio por Scienco en Moskvo.

Canko MURGIN

Rim.:La menciitan let.kun nia komentario,vi povas legi sur la 3.pago.

EL LA AMERIKA "PARADIZO"

Antaŭ kelkaj tagoj unu el niaj legantoj disponigis al ni leteron,ricevitan el Usono,kiun ni ĉi sube laŭvorte al vi prezentas.Ne eblas publiki nomon k. adreson de la aŭtoro pro danĝero de persekuto laŭ usonaj legoj.

"....Vi skribas,ke vi deziras korespondi kun iu el nia lando. Mi tre volonte akceptus tion,sed mia situacio estas tre malbona. Mi estas 55jaraĝa karbministo, havas edzinon kaj 20jaran edziniĝitan filinon,kies edzo dejoras en la aerforta armeo de Japanio. Antaŭe li estis en Koreio.Li volontulis por 4 jaroj en la armeon,ĉar post la finstudoj li ne trovis okupon.Mia filino,sperta

stenografistino estas hejme pro
ofta malsano de mia edzino. Ŝi
estas nervomalsana-"Tragedio de
laborista klaso"- Ofte ŝi tusas
kaj malfacile spiras.Ŝia koro
nesufiĉas pumpi la sangon.

Por rakonti pri mia situacio,
mi bezonus multan tempon kaj al
mi mankas la pacienco.Nur tre
mallonge mi volas skribi:Post
18jara laboro por sama karboaso
-cio mi estis maldungita kun 250
aliaj ministoj,post jaro estis
tiu minejo fermita. Centoj da
minejoj estas en USA fermitaj k.
la restantaj regule laboras mal
-bone.Dum la pasintaj 6 monatoj
la plimulto laboris nur 2-3 tag-
ojn monate.Komence de vintro ili
laboras 5-8 tagojn monate,kelkaj
ankaŭ pli.Oni importas el Venezu
-elo oleon,tre malmulte kostan.
Sekve karbo estas multe malpli
bezonata.En la minejoj estas in-
stalitaj modernaj maŝinoj.

Ministo en USA produktas 5 kaj
1/2 tunon da karbo tage,en Anglio
unu tunon,en Japanio duontunon -
proporcie - kaj la 1/3 parto da
ministoj estis maldungita.Maŝino
kaj oleo ŝtelis nian laboron. La
Minista Fonduso pagas renton ek
de 60.jarago al tiu,kiu laboris
20 jarojn en minejo.Ĉar al mi por
tiuj 20 jaroj mankas unu monato,
mi je mia 60ajarago ricevas neni-
on,se mi ne sukcesos labori anko-
raŭ ie unu monaton.Sed neniu min-
ejo akceptas min,pretekstante,ke
mi jam estas maljuna.Se mi trov-
us okupon en iu fabriko,mi devus
aligi al alia fakunuiĝo,mi neplu
apartenus al minista unuiĝo kaj
eĉ se mi laborus unu plian mona-
ton,la renton mi malgraŭ tio ne
ricevus. Kion fari ? Centmiloj
da ministoj estas senlaboraj.

Post mia maldungo mi trovis la
-boron en primitiva minejo.Tie mi
laboris laŭ metodoj antaŭ 50 jar-
aj,sen iu ajn maŝino. Sed "granda
fiŝo mangas malgrandan".Nia minej
-posedanto bankrotis.Li nepovis
pagi la altan salajron al ni kaj
pli malaltan la Minista Unuiĝo ne
permesis.Fermu la minejon! ĝi di-
ris.

Post 6monata kurado en 60 mej-
la cirklo 90 km.aŭdinte ĉie:"Vi
estas tro maljuna",mi fine trovis
laboron en duonmoderna minejo.Mi
laboris en profundega akvo. La
akvo falis je mi dum la tuta tago
sen interrompe kiel forta plu-
vo. Foje - foje mi ploris, sed
larmoj miksiĝis kun pluvanta
akvo. Mi ŝargis 2-3 tunojn da
karbo po tage kaj gajnis 2-3 $
Sed ĉar oni devas pagi"vetur-
salajron" $ 8,mi tiamaniere
gajnis 10-12 $ tage.Sed la teg-
mento en la minejo estis tre
danĝera pro la ofta akvofalo.Tian
mi devis labori por forigi ŝto-
nojn,por kio oni apenaŭ pagas.
Tutan tagon mi bezonis por ŝar-
gi du vagonetojn da ŝtonoj,dume
mi perlaboris $ 2 sen vetursa-
lajro.

La minejo maldungis 200 mini-
stojn,inter ili ankaŭ min. Laŭ
kutime oni maldungas ĉiam unue
la laste dungitajn.

Mi ricevis 6monatan subtenon
kiel senlaborulo.Kiam ĝi finis,
mi petis ŝtatan helpon kiel mal
-riĉulo.Mi ricevis respondon,ke
mia filino ricevas senlaborec-
helpmonon kaj helpon de edzo,ŝi
vivtenu min. Dum tuta monato mi
enspezis nek cendon,sed la el-
spezo estis $ 70.La filino dev-
is tion por mi pagi.

Nun mi ricevas la duan kaj la
-stan senlaborechelpon.La mini-
mumo estas $ 10,maksimumo $ 30.
Mi ricevas $ 28 po semajne,dum
5 monatoj. Poste ? ? - denove mi
devos almozpeti ĉe la ŝtato. Mi-
zera almozpetado!

Mi pagis 28,nun $ 25
por 4ĉambra loĝejo.En USA oni
generale havas 4 ĉambrojn.la pli
-multo.Do mi translokos al minej
-vilaĝeto XX.kie mi pagos nur $
12.10 por 4 ĉambroj monate. Post
2 semajnoj mi iros tien.Sed el
tiu vilaĝeto mi venis,ĉar mi de-
vis veturi tutan horon al minejo
kio kaŭzis grandan koston por
riparo de mia tro eluzita aŭtomo
-bilo.

Kiam mi plendis ĉe senŝtano,li
respondis,ke li ne povas helpi,
sed rekomendos min al Ruĝa Kruco
/por peti almozon/. Se tion vi,
Eŭropanoj,nomas "Paradizo",tiam
mi ne scias,kiel aspektis la pa
-radizo D.a.

En la tuta mondo sonas la vor
-to "PACO" sed en USA oni ĝin
ne aŭdas.Ne pro tio ke nia po-
polo kaj soldatoj ne volus pac-
on,sed postuli pacon,signifas
esti aĉa komunisto,malbenita
rugulo,vargo,fremdulo......"x/.

## N I A M O V A D O E N Ĉ E Ĥ O S L O V A K I O

BRNO, la rondeto kunvenas ĉiu marde de la 19.30 en hotelo "SLOVAN", Lidická 23. Jam estas planita programo gis fino de aŭgusto. La planitajn prelegojn ĉiam entaŭiras aktualaj informoj kaj post la programo sekvas amika diskuto.

CHVALATICE p.BÍTOV, okr. Znojmo, en tiu ĉi bela loko, ĉe la Digo de Vranov, arangos la Esp-rondeto-Junulvaro en Třebíč Someran Esp-Tendaron kun vico da Esp-kursoj, kiuj komencos la 3an de julio kaj daŭros gis la 13a aŭgusto. Por 14taga restado necesas 210.-Kĉs. 50% fervojrabato. Petu informon kaj aligilon ĉe k-do Jan WERNER, Helceletova 16, BRNO.

PARDUBICE, la rondeto kunvenas ĉiuĵaŭde de 19.30 en la uzina klubo de RFA. Sokolovna "Na Olšinkách". Nun ni sukcesis akiri bone situitan montrofenestron sur la ĉefstrato "Stalinova", sed mankas al ni ekspozicia materialo. Kiu povas disponigi, bonvolu sendi al k-do. Oldřich HRUBEŠ, Stalingradské nám. č. 55, PARDUBICE, Ĉeĥoslovakio. Ni rekompencos.

NI PETAS PARDONON

Pro manko da loko ni devas prokras ti kelkajn artikolojn por la venon ta n-o. Same ankaŭ koresp. anoncojn

OPAVA, ekspozicio "ARTO EN LA SERVO DE PACO" malfermigos la 9an de majo en kastelo HRADEC, kie Esp-o havos specialan angulon. K-do. Ant. Frantl kaj konata moravia verkisto Směja parolis en radiodissendo kaj ambaŭ laŭde akcentis la servon de Esperanto al la paco tutmonda.

MÍSTEK, la uzina gazeto "BEZRUČŮV TEXTILÁK" publikis laŭvortan tekston de la UNESKO-rezolucio pri Esp-o, kiun liveris k-dino. Marie Bartovská. Artikolo el la franca eldono de "PACO" pri A-kaj H-bomboj estis prelegita pere de uzina radio en tekstilejoj de Místek de k-doj Muron kaj Špinler. Krome ankoraŭ alia neesp-isto gin disaŭdigis per radio en sia vilago. La sama raporto pendis dum 1 monato en nia ekspoz. kesto sur frekventa loko apud artikoloj de ing. Bostwick kaj pri Bikini. Aliloke trovigas artikolo de Staveren, alvoko de la Mondpackonsilantaro, decidoj de la urbkonsilantaro en Coventry k.a. La kesto estas regule ĉirkaŭita de interesuloj kaj faras bonegan propagandon por nia afero.

NEFORGESU ! ALIĜU TUJ AL NIA TUTŜTATA !

A N O N C O J:

K-do. Duraj Petr, Nedbalova č. 20, OSTRAVA I., Ĉeĥoslovakio, kun ĉ. landoj interŝanĝas il.p.k. kaj p.m. Nepre al ĉiu respondos.

K-do. Frant. VOLDRICH, celnice, HORNÍ DVOŘIŠTĚ, okr. Kaplice, Ĉeĥoslovakio, pri lingvoj, nacioj kaj kulturo de Oriento kaj Afriko, pri filmo, muziko kaj teatro. Koresp. ankaŭ angle, ruse kaj franclingvo. Certe resp.

Kiu el okcid. landoj povus helpi al mia malsana frato? Li bezonas medikamenton "PROTAMID" kun klarigo pri gia uzado kontraŭ ischi-aso. Skribu al k-do. Jos. HOŘEJŠÍ, Domov ZVIL, Čechova ul, PLZEŇ, ČSR.

NI KONDOLENCAS

al k-do. St. GEŠINGER en PRAHA, kies kara edzino Marta mortis la 24an de aprilo 1955.

M U N I C I O P O R N I A B A T A L O

| | | | |
|---|---|---|---|
| K-do. J. Janáš-Hor. Slávkov | 3.-Kĉs | K-do. P. Tichota-Karl. Vary | 5.-Kĉs |
| K-do. J. Rozbroj-Dol. Suchá | 2.-" | K-do. A. Strejc-Hodkovičky | 3.-" |
| K-do. J. Prokop-Bílina | 10.-" | K-dino. M. Hirschová-Brno | 10.-" |
| K-do. L. Beneš-Praha | 3.-" | K-do. Nozar A.-Poděbrady | 7.-" |
| K-do. J. Blümut-Třinec | 2.-" | K-do. H. Čekal-Děčín | 1.-" |
| K-do. I. Sabela-Orlová | 3.-" | K-do. Frolíšek-H. Bojanovice | 3.-" |
| Esp-rondeto-Brno | 8.-" | K-do. L. Proskovec-Plzen | 10.-" |
| K-do. R. Skalický-Vítkovice | 10.-" | K-do. O. Hrubeš-Pardubice | 5.-" |
| K-do. D. Zubek-Karviná | 2.-" | K-do. J. Veselý-Kostelec nOL. | 5.-" |
| K-do. J. Stankuš-Orlová | 15.-" | K-do. J. Toufar-Brno | 5.-" |
| K-do. J. Kazda-Karl. Vary | 10.-" | K-dino. M. Hanusová-Brno | 3.-" |
| K-dino. Ž. Jankuvová-Bardejov | 5.-" | K-do. R. Hošek-Struhy-Vlkava | 3.-" |
| K-do. J. Rind-Batňovice | 8.-" | K-do. Zd. Hršel-Hrad. Král. | paperon. |

Eldonis: Závodní klub ROH-odbor ESPERANTO- TATRA, n.p. KOPŘIVNICE.
Redaktis: K-do Rudolf BURDA, Palackého nám. 6, PLZEŇ, ĈEĤOSLOVAKIO.